

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

*Feliĉan Novjaron 2023!*

*Estu pacoplena jaro tra la mondo !*

*Neporfitocela Organizo Esperanto Jokohamo*

## La 52a Zamenhof-Festo de Kanagawa en decembro

La 18an de decembro 2022 okazis en “Tergloba Placo” en urbo Jokohamo, la 52a Zamenhof-Festo de Kanagawa, t.e. por la esperato-rondoj en Jokohamo, Kawasaki, Huzisawa kaj Odawara. Ĝi okazis vid-al-vide post 3 jaroj, kaj kunvenis entute 21 personoj.

La malfermo estis de 12:30, kaj post “La Espero”, oni prezentis sin mallonge. Sekvis prezentado kun riĉaj projektaĵoj, (1) pri la UK en Kanado, de s-ro Suzuki Keiichiro (dekstra foto), (2) pri la Azia-Oceania Kongreso en Koreio, de s-ino Kitagawa Ikuko.

De 14:00 por 20 minutoj estis paŭzo kun librovendo. Post la paŭzo estis movada seminario gvidata de s-ro Namba Fumiharu por horo. Denove paŭzo.

Kaj jen kanto-tempo, givdate de triopo, s-inoj Murata, Imai kaj Matuno oni kune kantis 3 kantojn.

Ĉiuj rondoj prezentis sin, sed manke de la partoprenantoj el Huzisawa, ties stato estis anstataŭlegita. La verda flago estis transdonita al s-ro Okutu el Odawara por la venontjara Zamenhof-Festo, kaj la Festo estis finita. Poste, 3 el la partoprenantoj vizitis Esperanto-Muzeon Jokohaman laŭ la gvido de ges-roj Doi.

(Raportis Sibayama Zyun'iti)



## El korespondo kun ukrainiano

S-ro Tanigaŭa Hiroŝi el Jokohamo (iam vizitinta Odeson) longe korespondas kun s-ino Tatjana Auderskaja, loĝanta en Odeso el Ukrainio, kiu iam vizitinta Jokohamon. Kiel konate, Rusio ekinvadis en Ukrainion en februaro 2022, kaj ni prezentas kelkajn leter-interŝanĝojn iliajn. (la redaktoro)

### ● De Jokohamo, 14a de okt. 2022

Tre kara S-ino Tatjana Auderskaja,

Monatojn mi atendas de vi iajn informojn.

Japanaj Televidoj daŭre informas pri la bataloj en via lando. Mi ege maltrankviliĝas. Ĉu vi fartas sekure, ĉu Odesaj esperantistoj fartas sekure?

Bonvolu laŭeble frue sendi al mi viajn informojn.

Ĉiam tre amike via,

TANIGAŬA Hiroŝi

### ● De Odeso, 20a de okt. 2022

Kara, karega s-ro Tanigawa,

dankon pro via konstanta atento kaj zorgoj pri ni. Sed, bedaŭrinde, vi neniel povas helpi... Ĉe ni dume okazas nenio; sed la milito proksimiĝas, kaj ekde morgaŭ oni promesas limigojn aŭ elŝaltojn de elektro. Tiam fariĝos nebla tuta korespondado; do, se mi ne respondas, tio povas signifi, ke almenaŭ elektro kaj interreto forestas.

Mi sendas korajn salutojn al via kara familio kaj ankaŭ al niaj amikoj ges-roj Doi, Suzuki, Karibe.

Via Tanjo

### ● De Jokohamo, 14a de dec. 2022

Kara S-ino Tatjana Auderskaja,

Kiel vi nun fartas? Lastatempe japanaj televidaj informiloj informas pri "ukrainaj aferoj" tre malofte. Nur, ke daŭras ankoraŭ bataloj en Ukrainio. Mi kordeziras plej baldaŭajn pacajn tagojn en la tuta Ukrainio. Mi rememoras la belegan, brilantan marbordon de la Nigra maro, kie multaj homoj ĝuis gaje sunbrilon.

Atendante plej baldaŭan informon de vi,

Koramike via

TANIGAŬA Hiroŝi,

Membro de Jokohama-Esperanto-Rondo

### ● De Odeso, 19a de dec. 2022

Kara s-ro Tanigawa,

dankon pro via konstanta atento kaj zorgoj!

Ĉe ni vere oni elŝaltis elektron, kiel mi antaŭvidis en la pasinta letero. Tial mi ne ĉiam povas legi kaj ne ĉiam respondi.

Pri nia lando oni ne plu informas en via gazetaro, ĉar la temo jam ne estas moda. Ja gazetoj skribas ne pri tio, kio vere okazas en la mondo, sed pri tio, kio estas profita por ĝiaj posedantoj. Komence homoj interesiĝis, sed nun la temo tediĝas, kaj venas novaj sensacioj, ĉu ne?

Kaj pri bela, brilanta marbordo de Nigra maro... ĉi-somere oni malpermesis al ni viziti ĝin, plaĝumi, naĝi kaj ricevi sunbanadon :- ( Do, ni ne povis ĝui la maron, kaj ĝenerale plibonigis sian sanon apud ĝi.

Kaj mi bone memoras, kiel vi akompanis min al granda baseno en Jokohama, kaj kiel mi ĝuis tie :- ) Grandan dankon al vi!

Kiel fartas via familio? La filinoj certe jam fariĝis plenaĝaj... Pri kio ili okupiĝas?

Mi kore brakumas vin, vian familion kaj ĉiujn Hama-rondanojn, kiujn mi konas. En la VK (Virtuala Kongreso en 2022)-3 mi aŭskultis bonegan, tre interesan, altkvalitan prelegon de s-ro Suzuki. Bv transdoni al li mian apartan saluton.

Amike via, Tanjo

## EL NIA MUZEO

- ★ Gazeto el 1918 referencita: S-ino Michela Lipari el Italio serĉis poemon, kiun brita esperantisto Clarence Bicknell en la fruaj jaroj de la 20a jarcento aperigis en japana gazeto. Laŭ s-ro Hori Jasuo, ni aŭdis tiun serĉon kaj helpis, kaj trovinte peris 2 liajn poemojn, kiuj aperis en gazeto "Japana Esperantisto" en 1918.
- ★ Katalogitaj: Je la fino de 2022, estis registritaj 17 792 aĵoj, nome 4 635 libroj, 11 827 gazetoj kaj 1 330 aliaj aĵoj.